

RIMARKO PRI LA LINGVOUZO DE DIVERSETNAJ ESPERANTLINGVAJ VERKISTOJ

(H. Traunmüller, Stockholm, Svedio)

En sia artikolo pri "La vicordo de la frazelementoj en Esperanto" W.A.V.The-
maat (1) esploris interalie la relativan oftecon de E-lingvaj frazoj kun la obje-
kto antaŭ la predikato ĉe verkistoj kun malsamaj gepatraj lingvoj. En la sama
materialo li esploris la relativan oftecon de pasivaj predikatoj kun kaj sen age-
ntoj kaj la pozicion de kolektivaj aŭ negativaj frazelementoj.

Li supozis ke la stilo en revuoj de naciaj Esperanto-organizaĵoj estas influata
ĉefe de la gepatra lingvo de la aŭtoro, dum la stilo en certaj elektitaj noveloj,
poeziaĵoj ktp ĉefe estas influata de la tekstogenro kaj ne de la gepatra lingvo
de la aŭtoro.

La prezentitaj rezultatoj preterpasas la celon pruviti tion. Alivorte, ili montras
devion eĉ kontraŭan al tiu atendita. Mi klarigas per citaĵoj:

"Ekzemple en la epopeo "La infana raso" de Auld (gepatria lingvo: la angla) la
ofteco de la pozicio de la objekto antaŭ la subjekto kaj predikato (27,5%) estas
pli granda ol en "Hungara vivo" (16%) malgraŭ la fakto, ke en la angla lingvo
inversio de la objekto estas maloftega kaj en la hungara lingvo sufiĉe ofta." (p.
54)

"Eĉ en la sama tekstgenro la ofteco de pasivoj kaj agentoj estas ne ĉiam pli granda en tekstoj de aŭtoroj kun ligita vortordo en la gepatra lingvo ol en tekstoj de aŭtoroj kun libera vortordo en la gepatra lingvo" (p.62). Sekvas ekzemploj el la scienca, parolada, novela kaj revua genroj.

Pro la struktura malsimileco de ekvivalentaj ĉinlingvaj esprimoj, la ofteco de agentoj en "El Popola Ĉinio" ankaŭ ne estas atendita.

"La fakto, ke inter la tekstoj kun malpli ol ŝanca ofteco de komencaj ĝeneralaj frazelementoj estas unu de polo, ... faras la aserton de Grappin... ke en la pola lingvo nenio, ĉio, neniam, ĉiam, tro staras preskaŭ ĉiam frazkomence ... eĉ tre duba por la pola lingvo mem. Se tio ne jam okazis, mi forte rekomendas al pola lingvisto testi tiun tezon per statistika esploro de tekstoj." (p.63, mallongigita)

Ni scias ke personoj kiuj ne plene regas duan lingvon estas influataj de sia gepatra lingvo, kiam ili uzas tian duan lingvon. La influo montriĝas tiel ke ili sekvas la kutimojn konatajn el la gepatra lingvo. Sed krom tio, almenaŭ en la kazo de Esperanto, ŝajnas ekzisti kontraŭa tendenco, kiu ĉe personoj kiuj bone regas la lingvon kaj uzas ĝin skribe, povas superregi.

La menciitaj faktoj kvalite jam pruvas la hipotezon ke certaj verkistoj emas esprimi sin en E-o tiel kiel ili ne povas aŭ kiel oni ne kutimas en sia gepatra lingvo. Rilate la uzadon de pasivoj en la materialo de (1) tiu tendenco dominas ĝenerale.

La aserto de Grappin (2) do ne plu estas dubinda. Ankaŭ se ĝi montriĝus falsa, kaj devus esti "rimarkinde ofte" anstataŭ "preskaŭ ĉiam" en lia teksto, tio daŭre subtenus nian hipotezon.

Bedaŭrinde en (1) ne estas publikigita rezultata statistiko kiu ebligus pli detal-an kvantan pritrakton de la hipotezo.

La citita literaturo:

(1) Themaat, W.A.V., La vicordo de la frazelementoj en Esperanto, Scienca Revuo, vol. 25, n-ro 2/3, 1974.

(2) Grappin, H., Grammaire de la langue polonaise, Paris 1963.